

Intervjuo kun s-ro Fritz Liechti
pri la esperanto-balono de la poŝtmarko 70-centima
Radioprelego de Claude GACOND, SRI-805/256, 1979 marto 15 kaj 17

<http://www.esperanto-gacond.ch/SRI/Radiokasedo-1979-37/SRI-1979-37-A-1-256-805-1979-03-15-17-Claude-Gacond-Intervjuo-kun-s-ro-Fritz-Liechti-pri-la-esperanto-balono-de-la-poshtmarko-70-centima.mp3>

Cl.- Salutas nome de Svisa Radio Internacia Claude Gacond, kiu intervjuas sinjoron Fritz Liechti el Zürich rilate al la balono, kiu troviĝas sur la svisa poŝtmarko pri esperanto.

S-ro Liechti, mi petas vin eble detale rakonti al ni, kiel naskiĝis kaj poste disvastiĝis la tuta afero kun la balono kiu troviĝas sur la poŝtmarko? Kaj do, ankaŭ la Esperanto-poŝtmarko.

FL.- Mi tre volonte volas tion fari kaj mi provas koncize resumi la tutan historion. Post kiam mi tre ofte meditis pri la propagandmetodoj en Esperantujo, mi ricevis iun tagon telefon Alvokon de sinjoro Bruno Rohr, kiu ne estis Esperantisto. Li rakontis al mi, ke li estas balonpiloto kaj intencas aĉeti propran, tute modernan varmaeran balonon. Kutime balonoj portas propagandan surskribon de iu cigareda, cigara aŭ ĉokolada marko. Tion mi ne ŝatas, li diris. Li aldonis: Mi pensis pri io neŭtrala, io internacia kaj mi demandas vin, kion vi opinias pri la nomo Esperanto sur la balono?

Cl.- Kaj kiel efikis al vi tiu ĉi ideo de balonpiloto ?

FL.- Ho, ho! Kiel fulmo trairis mian kapon kaj mi tuj sciis, ke tio estas la de mi serĉita solvo.

Cl.- Mi povas imagi ke por realigi vian malkovron, vi troviĝis tre verŝajne antaŭ multe da laboro.

FL.- Jes. En multaj preparoj ni ellaboris la planon. La piloto komencis studi la teknikajn detalojn kaj mi zorgis pri la komunikado inter la Esperantistoj. Al mia informa cirkulero venis baldaŭ multaj tre pozitivaj respondoj, kiuj kuraĝigis nin daŭrigi la laboron. Mendon post mendo de la filatela balonkoverto, kiun ni planis, alvenis. Kiam ni atingis la nombron de 1500 kovertoj, ni sciis, ke ni ne povas retiri la planon. Estus tro granda senluziigo de la esperantistoj, kiuj senpacience atendis tion.

Cl.- Kaj do kiom da tempo daŭris tiu preparlaboro?

FL.- Post unujara tre streĉa laboro de la piloto, de mia edzino kaj mi, ni povis anonci la unuan oficialan flugon, la poŝtflugon, kiu kunportis 2500 bele afrankitajn kovertojn de la Esperanto-balono. Tio okazis la 14-an de decembro 1976. Nur kelkajn tagojn poste, nome la 18-an de decembro 1976 ni povis inviti al la inaŭguro de la unua varmaera balono ESPERANTO.

Cl.- Kie fakte okazis tiu ĉi inaŭguro ?

FL.- Tiu inaŭguro okazis en la tiel nomata loko Goldenen, proksime de la urbo Zürich. Goldenen estas iom alte situata, kaj en la valoj estis dum tiu tago densa nebulo, do oni ne ricevis la permeson fari flugon. Feliĉe, oni povas hodiaŭ diri, ĉar ni tie en la belega vetero ni povis fari preskaŭ 25 suprenirojn kaj la esperantistoj havis la okazon foje flugi en la esperanto-balono.

Cl.- Ĉu vi baptis la balonon?

FL.- Jes, estis impresplena eta festo. Mia edzino estis la baptonklino kaj baptis la balonon per botelo de ĉampano. La entuziasmo inter la ĉeestantaj esperantistoj estis tre granda. Kaj la unuan flugon partoprenis la baptonklino, kiu unue tute ne volis eniri, sed poste estis tre ĝojigita pri la rezulto, pri la supreniro en nia balono. Ek de tiam la esperanto-balono ofte transflugas diversajn regionojn kaj portas la balonon ĉien. La surskribo ESPERANTO havas longecon de 8 metroj kaj la literoj estas altaj unu metron. La verda stelo havas diametron de proksimume 2 metroj. Ĉie, kie la balono aperas, ĝi manifestacias, ke Esperanto vivas!

Cl.- Kaj kiel la balono rilatas al la poŝtmarko, fakte?

FL.- Kiel mi jam diris en la lasta intervjuo, la ideo de Esperantopoŝtmarko okupis min tre forte, post kiam oni sciis, ke la Universala Kongreso 1979 okazos en Svislando. La ideon mi submetis al la LKK, kiu tre pozitive akceptis ĝin. La LKK faris petskribon al la ĝenerala direkcio de la Svisa Poŝto, PTT. Daŭras multajn monatojn, kaj preskaŭ ni fariĝis iom senpacienca, sed finfine ni ricevis la informon, ke la propono estis akceptita. Ĉu vi povas imagi la ĝojon, kiun ni havis? Jam ekestis en mia kapo la kreado de konvena motivo. Ĉar oni supozis, ke eventuale oni havos la ŝancon kundiskuti tiun punkton. Laŭ invito de la LKK mi estis komisiita kun la LKK-prezidanto partopreni en la diskutoj kun la ĝenerala direkcio de la PTT. Al tiu momento mi atendis, ĉar mi bone konsciis, ke mi devas nepre submeti kelkajn proponojn. La priparoloj estis tre interesaj kaj fruktodonaj. Oni finfine decidis, ke la Esperanto-balono estu la motivo sur la kreota Esperanto-poŝtmarko. Grafikisto ellaboris, en komisiono de PTT, unu el la proponoj. Ĵuraro, en kiu ni ankaŭ partoprenis, bontrovis pri la ellaborita propono kaj post kelkaj etaj ŝanĝoj oni definitive decidis.

Cl.- Alvenis la bona dato.

FL.- Jes, nun la 21-an de februaro 1979 nia sopirita Esperanto-poŝtmarko finfine aperis.

Cl.- Mi povas imagi vian ĝojon!

FL.- Ho jes! Ĝi estis tre tre granda.

Cl.- Kaj ĉu tiu poŝtmarko bone vendiĝis?

FL.- Jes, laŭ la ĝisnunaj ricevitaĵoj impresoj, ĝi bone vendiĝas. Ĉiutage alvenas mendoj el diversaj landoj.

Cl.- Ĉar vi faras filatelaĵojn, ĉu ne?

FL.- Jes, ankaŭ. Ni faras diversajn filatelaĵojn.

Cl.- Do, pri tiu ĉi temo, filatelaĵoj pri la Esperanto-balono kaj la poŝtmarko, ni refoje intervjuos vin la venontan semajnon.

FL.- Dankon.

Cl.- Karaj geaŭskultantoj, se vi deziras ricevi kelkajn skribajn sciigojn pri la filatela servo okupiĝanta pri la balona poŝtmarko 70-centima, ĵus eldonita de svisaj PTT, vi povas skribi al Svisa Radio Internacia. Adreso: 3000 Berno 15, Svislando. Kaj mi volonte sendos viajn informpetojn al sinjoro Fritz Liehti, kiu povos respondi al vi. Vi ĵus aŭdis lin. Vi tamen bonvolu ne forgesi aldoni internacian respondkuponon por kovri liajn respondkoston.

Vi aŭdis elsendon de Svisa Radio Internacia. Claude Gacond intervjuis sinjoron Fritz Liehti. Ĝis reaŭdo!

*Kopirajto © Claude GACOND, www.esperanto-gacond.ch
Prilaboris: [Stefano KELLER](#), oktobro 2013*